teĥniko ĉe la Pedagogia Fakultato de la Karlo-universitato en Prago, la ĝistiama centra laborejo, transprenis en 1970 ĝian gvidon R. Polouš kaj en 1972 Z. Křečan. La realigado de la originaj projektoj enkadre de la ŝtata kaj la fakultata planoj plenumiĝis kun kreskantaj obstakloj. La esploron oni fokusigis dudirekte. Z. Křečan kun eksteraj specialistoj el teĥnikaj altlernejoj laboris ĉe la esplorprojekto „Teĥnologie orientita teorio de la instruaŭtomatoj". R. Polouš, M. Čech kaj J. Mracký koncentriĝis al la projektoj „Teĥnikaj helpiloj por la empiria esplorado", „Konstruado de la porgrupaj instrumaŝinoj por la handikapitoj" kaj „Programoj por la instrusistemoj". Por la lasta projekto oni ekipis 2000 lernejajn klasojn per komplete aŭtomatizita kaj programita instruado de la metilernantoj. En la jaroj 1971 kaj 1975 okazis ankoraŭ du seminarioj titolitaj „Praga simpozio pri la kibernetika pedagogio"; la dua koncernis kunlaboron nur kun socialismaj ŝtatoj. D. Tollingerová transiris el PÚJAK ČSAV en la ministerion por lernejoj kaj de ŝi gvidata teamo preskaŭ likvidiĝis. La projekto de la ŝtata plano, kiun ŝi direktis, „La revoluciaj ŝanĝoj en la klerigado kaj la modernaj didaktikaj teĥnikiloj en la socialisma socio" estis finita per nura, koncize formulita interna raporto. J. Hniličková-Fenclová gvidis en la Pedagogia Fakultato de la Karlo-universitato en Prago trijaran seminarion pri la didaktika testado kaj pri la mezureblo de la instrurezultoj en la instruado de fiziko. Enkadre de ĉi tiu seminario Z. Půlpán en la Pedagogia Fakultato en Hradec Králové lanĉis labortaskon pri la uzeblo de la informadiko en la didaktikaj testoj. En la katedroj de la teĥnikaj altlernejoj fondiĝis unuopaj fakultataj projektoj celantaj ĉefe la ekipigon de la klasĉambroj; ekzemple la Agrokultura Altlernejo en Prago esploris la didaktikajn eblojn kaj la efikojn de la fermita televida cirklo.

1976 - 1980

En ĉi tiu periodo transiris la esploro de la prospektiva pedagogio en aliajn laborejojn kaj en aliajn esplorplanojn. En la ministeria Esplorinstituto de la Teĥnikaj Studoj oni kunordigis projekton de la sekcia plano „Scienca direktado de la edukprocedo en altlernejoj". Ĉi tiun projekton partumis sufiĉe granda esplorkolektivo el la tuta respubliko, kiu, evidente sen iu ajn ligiteco, komencis esplori kelkajn temojn de la prospektiva pedagogio. Signifaj estas la laboraĵoj de E. Mazák pri la sistemo de la direktado de la studenta laboro kaj de P. Byčkovský pri la evidentigo de la instrurezultoj.

M. Čech, J. Tůma, R. Palouš kaj Z. Křečan transiris el la Pedagogia Fakultato de la Karlo-universitato en Prago en aliajn okupojn. J. Fenclová transiris el la PF de la UK en la Instituton de Fiziko de la ČSAV en Prago, kie ŝi kunordigis unu esploran taskon enkadre de la projekto de la ŝtata esplorplano „Modeloj de la perspektiva klerigsistemo en la socialisma socio", kiu koncernis modelon de instruado de fiziko. En ĉi tiu projekto, kiu celis la modeligon kaj la projektigon de la didaktikaj sistemoj en fiziko, trovis sian lokon ankaŭ kelkaj laboraĵoj el la prospektiva pedagogio, ekzemple la studaĵoj de Z. Půlpán pri la modeligo de la abstrakta procedo. Z. Půlpán ligis kontaktojn kun la Matematika kaj ankaŭ kun la Psikologia Institutoj de la ČSAV. En PÚJAK ČSAV J. Kulič plue okupiĝas pri la prospektiva pedagogio, koncentriĝante precipe al la problemo de la rilato inter la klerigo kaj la aŭtomatizo enkadre de pli larĝa projekto de la ŝtata plano, kiu celas disvolvon de la lerneja sistemo en la etapo de la scienc-teĥnika revolucio. En la jaroj 1981 - 1985 daŭras la esploroj de la antaŭa kvinjaro.

La esploroj en la prospektiva pedagogio koncentriĝas ĉirkaŭ E. Mazák. Z. Půlpán kaj J. Kulič laboras apartigite en la sfero de la kibernetika pedagogio.

2.4 La influo de la prospektiva pedagogio al la kleriga praktiko

La scienca kaj la teĥnologia strebadoj en la prospektiva pedagogio projekciiĝis en ĉiuj ŝtupoj de la klerigado, kvankam ne egalnivele en ĉiuj sferoj. La ĉefaj periloj estis:

- produktado de modernaj teĥnikaj lerniloj,
- klerigo de la instruistoj,
- modernigo de la universitata klerigo.

Produktado de instruiloj

Prospektiva pedagogio kaj la produktado de instruiloj evoluis interage kaj en la sfero de la aŭdovidaj instruiloj kaj en la sfero de la instru-aŭtomatoj. Fine de la sesdekaj jaroj efektive ĉiu baza kaj meza lernejoj disponis pri magnetofono, diaskopo kaj projekciilo de filmoj. Specialaj magnetofonoj de la firmao Tesla konstante modifiĝis por la lernejaj bezonoj. Ankaŭ la nacia entrepreno „Učební pomůcky" (Instruiloj) enkondukis vicon da novaj instruiloj. En 1980 ĉiuj lernejoj estis ekipitaj per epidiaskopoj. Frue oni komencis produkti la porlernejajn analogajn kalkulilojn. En 1962 oni konstruis lernejan ekzamenmaŝinon REPEX, kiu estis multe uzata. Ankaŭ la instrumaŝinoj EVA kaj MULTITUTOR, aĉeteblaj por akcepteblaj prezoj, estis ofte instalataj en la ĉeĥoslovakaj lernejoj. Komence de la sepdekaj jaroj la firmao Tesla produktis la instrumaŝinon UNITUTOR, kiun oni eksportis. La larĝskala uzo de ĉi tiuj instruiloj ne estas en la bazaj kaj mezaj lernejoj kontentiga. Plene uzataj estas ili precipe en la specialaj kibernetikaj gimnaziaj klasoj, en mezaj teĥnikaj lernejoj kaj en kelkaj metilernejoj. Tamen ekzistas tuta vico da entuziasmaj instruistoj en bazaj kaj mezaj lernejoj, kiuj propriniciate kaj propramane instalis aŭtomatizitajn klasĉambrojn. Laŭ modesta takso funkciis en 1975 en Ĉeĥoslovakio 50.000 instrumaŝinoj kaj retrokuplaj aparatoj krom trejniloj kaj imitiloj. En Bratislava estis fondita entrepreno „Psikodiagnostikaj kaj didaktikaj testoj", kiu taskiĝis produkti instruilojn por ekzamenado kaj testado.

Klerigo de pegagogoj

Multaj rezultoj de la prospektiva pedagogio eniras lernejojn pere de la klerigo de la instruontoj. La instruprogramo por pedagogoj entenas memstaran studobjekton „Enkonduko en la industrian produktadon", kiun oni povas studi en kombino kun matematiko, fiziko aŭ alia lernoobjekto. Ĉi tiuj instruistoj ricevas depost 1966 specialan staĝon pri la bazo de la kibernetika pedagogio kaj pri la instruteĥniko laŭ la programoj proponitaj de la Pedagogia Fakultato de la Karlo-universitato en Prago. Krome en ĉi tiu fakultato estis ellaborita 20-hora kurso de la instruteĥniko por ĉiuj pedagogoj kaj tiu estas depost 1970 deviga temo de ĉiuj porinstruistaj fakultatoj. La studplano de ĉi tiu kurso en la jaro 1975 duiĝis:

1) instruteĥniko
2) fundamentoj de la pedagogia kibernetiko kaj de la programado

La kandidatoj ricevas enkondukajn sciojn pri la teĥnika funkcio de la instrumaŝinoj

kaj pri ilia manipulado kaj pri la programigo de la koncerna softvaro. Laŭ la modelo de la PF de la UK estis establita fako de la instruteĥniko en pluraj pedagogiaj altlernejoj. Menciinda estas la fakto, ke ĉi tiu paŝo influis kreon de simila aranĝo en Aŭstrio.

Pluaj altlernejoj

Post la jaro 1970 okazis signifa modernigo de la instruteĥniko en la alternejoj, precipe per enkonduko de projekciiloj kaj komputoroj en la lernoprogramon. En pluraj altlernejoj kaj universitatoj, ekzemple en Prago, Hradec Králové, Brno kreiĝis komplete ekipitaj aŭdovidaj instalejoj. La aŭdovidaj instalaĵoj kombiniĝas kun komputoroj en unuecajn didaktikajn aŭtomatizajn sistemojn. Depost 1975 ĉiuj altlernejaj studentoj studas devigan lernoobjekton „Enkonduko en la programadon". En la jaroj 1970 - 1980 sub la protekto de la ministerio por lernejoj efektiviĝis 8 tutŝtataj konferencoj pri la uzado de la komputoroj en la instruprocedo kaj en la administrado de lernejoj. Ĉi tiu nova tereno de la prospektiva pedagogio restas tamen ankoraŭ pli en pionira kaj eksperimenta etapo.

Literaturo

BYČKOVSKÝ, P.: Základy měření výsledků výuky. Tvorba didaktického testu. Čes. Vys. Uč. Tech., publikace Výzkumného ústavu inženýrského studia, Praha 1982. (Principoj de la enketado pri la rezultoj de la instruado. Konstruo de la didaktika testo.)
Články v. časopisech (Artikoloj en gazetoj): Pedagogika. Bulletin kybernetické pedagogiky pedagogické fakulty UK. Učební pomůcky ve škole a v osvětě. Elektrotechnický obzor. Odborná výchova. Jednotná škola. Vysoká škola. Automatizace. Filozofický časopis ČSAV. Programované učení.
Educational Cybernetics. Abstracts of the 1st Prague Symposium on Educational Cybernetics. Čs.Kybern.Spol., Praha 1969. (Kibernetika pedagogio. Resumo el la unua Praga simpozio pri la kibernetika pedagogio).
Educational Cybernetics. Abstracts of the 2nd Prague Symposium. Čs.Kybern.Spol. Praha 1973 (Kibernetika pedagogio. Resumo el la 2a Praga simpozio pri la kibernetika pedagogio.)
FENCLOVÁ, J.: Fyzikální vědomosti našich studentů. Studie Čs. Akad. Věd. Academia, Praga 1980. (Scioj de niaj studentoj en fiziko).
HNILIČKOVÁ, J., M. JOSÍFKO, A. TUČEK: Didaktické testy a jejich statistické zpracování. Stat.Ped. Nakl., Praha 1970 (Didaktikaj testoj kaj ilia statistika prilaboro)
HNILIČKOVÁ, J.: Výzkum formalismu ve znalosti fyzikálního zákona. Studie ČS.Adad. Věd. Academia, Praha 1970. (Esploro pri la formalismo en la sciakiro de fizikaj leĝoj).
Kolektiv autorů: Moderní technické prostředky ve výuce. Učebnice pro vysoké školy. Stat.Ped. Nakl., Praha 1974. (Aŭtora kolektivo: Modernaj teĥnikaj instruiloj)
KULIČ, V.: Člověk - učení - automat. Stat. Ped. Nakl. Praha 1984. (Homo - lernado - aŭtomato)
Kybernetika, technika a výuka. Sborník Ped.Fak.Univ.Kar., Praha 1971. (Kibernetiko, teĥniko kaj instruado. Kolekto.)
Kybernetická pedagogika. Sborník z celostátního semináře. Cs.Kybern.Spol., Hradec Králové 1973. (Kibernetika pedagogio. Kolekto el la tutŝtata seminario)
MAZÁK, E. a kol.: Systém řízení samostatné práce studentů v předmětu. Čes.Vys.Uč.Tech., publikace Výzk. Úst.Inž.Studia, Praha 1984. (Organiza sistemo de memstara studenta laboro en instruobjekto)
POLOUŠ, R.: Dialog a výchova. K modernizaci metod. Praha 1965. (Dialogo kaj eduko. Kontribuo al la modernigo de metodoj)
POLOUŠ, R.: Didaktika technických výukových zařízení. Krajs. Ped. Úst., Praha 1969. (Didaktiko de teĥnikaj instrumeĥanismoj)
Příruční slovnik pomůcek didaktické techniky. Okres.Nár. Výb., Chomutov, 1973 (Helpa vortaro pri la didaktikaj teĥnikaj instruiloj)
Programované učení a vyučovací stroje. Sborník materiálů z 1. celostátní konference Ped.Úst.J.A. Kom.Čs.Akad.Věd, Praha 1964, Stat.Nakl.Techn.Lit.
(Programita instruado kaj la instrupeiloj, kolekto de la referaĵoj el la unua tutŝtata konferenco)

Programované učení a vyučovací stroje. II. Sborník Ped.Úst.J.A.Kom.Čs.Akad.Věd, Praha 1966. (Programita instruado kaj la instruperiloj. 2a kolektaĵo)
Projekt televizního vysokoškolského studia pro výuku posluchačů. Ped.Fak.Univ.Kar., Praha 1975. (Projekto de la televida altlerneja studprogramo por la studentaro)
PŮLPÁN, Z.: Informační vlastnosti didaktického testu z fyziky. Studie Čs.Akad.Věd. Academia, Praha 1977. (Informiĝeblo el la didaktikaj testoj pri fiziko)
PŮLPÁN, Z.: Vytváření struktur ve středoškolské fyzice. Ped.Fak. Hradec Králové 1982. (Strukturado en mezlerneja fiziko)
TOLLINGEROVÁ, D., V. KNĚZŮ, V. KULIČ: Programované učení. (Programita instruado)
TŮMA, J., Z. KŘEČAN: Vyučovací stroje. Stát.Nakl.Techn.Lit., Praha 1967. (Instruperiloj)
Využitie počítačov vo vyučování a riadení škol. Zborník z III. konferencie. Min.Škol., Žilina, Žilina 1975. (Uzo de la komputoroj dum la instruprocedo kaj en la direktado de lernejoj)

Ricevita: 1988-10-12

Adreso de la aŭtorino: AProf.Dr. Jitka Brockmeyer, Bayernweg 37, D-4790 Paderborn

Geschichte der prospektiven Pädagogik in der Tschechoslowakei (Kurzfassung)

Im einleitenden Teil 1 der Studie wird das tschechoslowakische Schulwesen kurz beschrieben. Nach einer Information über die gegenwärtige schulpolitische Situation wird die Tradition und Entwicklung des Schulsystems und seine heutige Struktur umrissen.

Der wesentlich umfangreichere Teil 2 der Arbeit ist dem eigentlichen Thema, der prospektiven Pädagogik, gewidmet. Einige entsprechende Ideen kann man schon weit zurück in der Geschichte der tschechoslowakischen Pädagogik finden, z.B. im 17. Jahrhundert bei J. A. Komenský oder in der ersten Hälfte des 20. Jahrhunderts bei V. Příhoda oder in den experimentellen Schulen von T. Bata. An ihre Tradition konnte die Pädagogik erst wieder nach dem Jahre 1960 anknüpfen. In der prospektiven Pädagogik kann man vier Richtungen unterscheiden, die auch beschrieben werden:

- Emprirische Forschungen im Unterricht,
- der programmierte Unterricht,
- die Unterrichtstechnologie und
- die kybernetische Pädagogik.

Die letzte Richtung, die sich unter M. Lánský entwickelte, kann man als die prospektive Pädagogik im engeren Sinne des Wortes bezeichnen.

Die Studie informiert über ihre Entwicklungsphasen in den Jahren von 1960 bis 1984, beschreibt die Forschungsprojekte, die beteiligten Forschungsinstitutionen und Gruppen. Zum Schluß wird die Auswirkung der prospektiven Pädagogik auf die Schulpraxis und die Lehrerausbildung gezeigt.

Paderborner Novembertreffen 1988

Dem diesjährigen, traditionellen Paderborner Novembertreffen, das zum zweitenmal in den Räumen des InBIT Paderborn-SchloßNeuhaus stattfand, ging am 14. und 15. November ein 8-stündiger, deutschsprachiger AIS-Kurs „Medizinische Expertensysteme" voraus, den OProf.Dr.Miloš Lánský und PDoc.Dr.habil. Krystina v.Niewiadomski-Kauffmann durchführten.

Das eigentliche Werkstattgespräch, an welchem auch Wissenschaftler aus Polen, Irland, Frankreich, Spanien, Indien und China teilnahmen, bestand aus dem 10. Interlinguistischen Werkstattgespräch (am 17.11. mit Vorträgen von PDoc. R.Schulz und H.Behrmann in ILo) und dem 28. Kybernetisch-Pädagogischen Werkstattgespräch (am 17. und 18. 11. mit Referaten von Prof.Feng, Dipl.-Päd. Lobin, Prof.Hengst, Prof.Dr.Aßheuer, Prof. Dr.Companys, Luis de Yzaguirre, ASci.Qiao, ADoc.Dr.Bormann, B.Pavlu, und Prof.Dr.Byrne - neben Projektvorstellungen und Zwischenberichten von Prof.Dr.Frank, Dipl.-Psych.Dipl.-Ing. R.Herper und R.Maruhn) sowie einigen freien Referaten (PDoc.Dr.habil. Niewiadomski-Kauffmann, Dr.M.v.Petzinger, Dr.W.D.E.Bink, Prof.Dr.Byrne und Prof.Dr.Strombach).

Aus Anlaß des Werkstattgesprächs führte der Europaklub (Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung e.V.) unter ihrem neuen Präsidenten Prof.Dr.Schick am 16.11. eine außerordentliche Mitgliederversammlung durch, und am 19.11. der Arbeitskreis für liberale europäische Sprachpolitik (ALEUS) ihre Jahresversammlung, bei welcher G.Lobin als Vorsitzender wiedergewählt wurde. Er war auch Tagungsleiter des diesjährigen Novembertreffens, dessen organisatorische Träger das Institut für Kybernetik/Universität Paderborn, die Arbeitsgruppe Kybernetik der GPI, InBIT und AIS waren.

Sammelband „Kybernetik und Bildung V"

Die Wallenrodtsche Verlagsanstalt Hamburg kündigt für Anfang 1989 das Erscheinen von Band V der Serie „Kybernetik und Bildung / Kibernetiko kaj klerigo" (deutsch mit Knapptexten in ILo) an. 15 Wissenschaftler berichten aus ihrer Forschungsarbeit: M.Hengst, S.Lehrl, B.Fischer, W.F.Schmid, R.Hilgers, W.Reitberger, E.Geisler, W.Klimesch, K.Weltner, D.Ungerer, W.D.E.Bink, V.Mužić, G.Lobin, W.Strombach, H.Richter. Der Themenbereich reicht von der Informationspsychologie bis zu anthropologisch-philosophischen Fragen, von Problemen des Gedächtnisses und des Bewußtseins bis zu Überlebensstrategien. Sbskriptionspreis (Bestellschluß: 31.12.1988 beim Verlag, Postfach 501605, Hamburg 50)) 11,- DM, späterer Buchhandelspreis 16,80 DM.

2a Studadsesio de AIS en Krynica

PDoc.Dr.habil.T.Tyblewski (Bartka Zwycieżcy II/1, PL-58-500 Jelenia Gora) preparas duan studadsesion en la kuracloko Krynica, kiu okazos de la 15a ĝis la 28a de majo 1989. La programo enhavos plurajn po 8-horajn kursojn kiuj finiĝos per regulara ekzameneto. La instrulingvo estos senescepte ILo. Por atingi Krynica, la malplej ĝena vojo estas veni ĝis Krakovo. Laŭ horaro, kiun interesitoj ricevos kune kun la programo kaj la aliĝkondiĉoj en la monato februaro, oni trajne aŭ aŭtobuse povos pluveturi ĝis Krynica.

12e Congrès International de Cybernétique

L'Association Internationale de Cybernétique (AIC) organise son 12e Congrès International de Cybernétique du 21 au 25 août 1989 à Namur (B). Les langues officielles sont le français et l'anglais et dans les symposiums relevant de la „Cybernétique et les sciences humaines" l'ILo. 22 symposiums sont anoncés, y enclus le symposium „Lingvokibernetiko kaj kibernetika pedagogio" dont l'animateur est Prof.Dr.Helmar Frank, et donc la langue principale sera l'ILo.

Les auteurs de communications sont invités à faire parvenir au Secrétariat un résume ne dépassant pas une page. Date limite: 15 janvier 1989. L'auteur d'une communication sera informé de son acceptation fin de fevrier. Les exposés et communications reellement présentés a l'occasion du Congrès, seront publiés.

Le droit d'inscription (5.000 F.B. pour les membres de l'AIC et auteurs de communications, 1.000 F.B. pour jeunes chercheurs (sous présentation d'une attestation de leur université) et 7.000 F.B. pour autres participants) comprennent la participation au Congrès, les documents préparatoires et les pauses-cafes.

Adresse: AIC, Palais des Exposition, Place André Rijckmans, B-5ooo Namur.

6. Sanmarinesische Universitäre Studientagung (SUS 6)

SUS 6 findet vom 26.8. bis 4.9. 1989 in San Marino statt. Vortragsanmeldungen werden bis Ende Februar angenommen: offizielle Sprachen: Deutsch, Englisch, Französisch, Italienisch, ILo. In den 6 Sektionen der AIS finden wieder je 8-stündige Kurse unter Leitung von Professoren und Dozenten der AIS statt. Hierbei ist ILo Unterrichtssprache. Intensivkurse in ILo zur Vorbereitung von Anfängern gehen dem Hauptprogramm am 26. und 27.August voraus. Tagungsgebühr bei Anmeldung vor dem 26.März 1989: 30,- DM, später 50,- DM.

Adresse: Präsidialsekretariat der AIS p.a. IfK, KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn.

Offizielle Bekanntmachung

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Prezidanta Sekretariejo: KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn, Tel. (0049-/0-)5251-64200 ✆
Subtena Sektoro: p.a. ADoc.Dr.L.Weeser-Krell univ.prof., HerbramerWeg 9, D-4790 Paderborn

Finredaktita: 1988-12-10 /1688pfR *Redakcia respondeco: OProf.Dr.Helmar FRANK*

Protokolo de la 5-a Kunsido de la Subtena Sektoro de AIS

okazinta 1988-08-28/1687pfR en la Convento S.Maria dei Padri Servi di Maria, Valdragone

1. (Formalaĵoj)

La Asembleo estis kunvokita por la 17a horo. Anstataŭante la ankoraŭ ne alvenintan direktoron la prezidanto de AIS malfermas 17:30 h la kunsidon, cirkuligas liston por konstati la ĉeestantaron, kaj demandas, ĉu iu ĉeestanta subtena membro deziras krom ILon alian oficialan lingvon de AIS kiel laborlingvon de ĉi tiu kunsido. Bac. sc. morph. h. c. Myriam MICHELOTTI postulas la aldonon de la Itala; neniu postulas krome la Anglan, Francan aŭ Germanan. Oni elektas kiel protokolantinojn Ines Ute FRANK por ILo kaj ASci. Ariella COLOMBIN por la Itala. Neniu deziras ŝanĝojn de la tagordo. Neniu nesubtena membro ĉeestas. Neniu kontraŭas la supozon de la prezidanto, ke la Asembleo estas kvoruma.

2. (Ĝenerala raporto)

La direktoro ne havas sciigindaĵojn, kiuj ne pli bone estu prezentotaj al la Ĝenerala Asembleo.

3. (Financa raporto, senĉarĝigo, AKU-kurso)

Anstataŭante la trezoriston de AIS la prezidanto aplikas la proceduron de art. 4.1 de la kotizregularo por decidigi pri la AKU-kurzoj ekde la 3-a de septembro. Laŭ sanmarina bankinformo oni pagis la 26an de aŭgusto 1987 72.400,- LIT, la 26an de aŭgusto nunjara jam 73.900,- LIT por 100,- DM, do je plialtigo de 1.500,- LIT pli. Sekve ankoraŭ la DM estas la pli stabila valuto. Ĉar por 100,; DM momente estas haveblaj 83 internaciaj respondkuponoj, do pli ol 80 sed malpli ol 100, li proponas, ke pluvalidu la kurzo 1 AKU = 100,- DM. Neniu kontraŭas. La duono de la elkalkulita valorplialtigo estas 750,- LIT. Adiciante ilin al la nuna valoro de la valoro de 1 AKU en DM, do al 73.900,- LIT, oni ricevas 74.650,- LIT. La prezidanto proponas kiel valoron de la AKU la rondan sumon 1 AKU = 75.000,; LIT. Neniu kontraŭas.

La direktoro ADoc.Dr. Lothar WEESER—KRELL legas en ILo sian raporton pri la bilanco. Pro la 157 subtenaj membroj, kelkaj libro-vendoj kaj malmultaj mondonacoj restis post subtraho de la subteno pagita al la scienca sektoro (30% de la membrokotizoj) kaj de malmultaj aliaj elspezoj gajno je 19 AKU en la pasinta jaro.

Ĉar oni deziras konstruigi internacian kulturdomon en San Marino, kiucele nura ŝparado de la propra kapitalo ne sufiĉus, oni decidas peti pere de la delegitino de la Respubliko de San Marino ĉe UNESKO, Edith TAMAGNINI, tie pri financa helpo.

La Asembleo senŝarĝigas la estraron rilate la bilancan jaron 1686pfR, kiu daŭris de la 3a de septembro 1986 ĝis la 2a de septembro 1987.

4./5./6. (Kromaj tagordaj punktoj, elektoj)

Nek estis anoncitaj anticipe aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1 aliaj tagordaj punktoj, nek necesas ĉijare elekti novan estraron aŭ aleelekti unuopan estraranon pro retiriĝo.

7. (Diversaĵoj)

Oni diskutas la eblecon organizi kursojn pri ILo en San Marino fare de iu AISano por la subtenaj membroj en San Marino. Estraranino Miriam MICHELOTTI, kiu tiun proponas, pretigu liston de interesitoj. La kurso povos okazi en oktobro kaj novembro en la ŝtata gimnazio.

Fino de la Asembleo: ĉ. 19 h.

Protokolis:
Ines Ute FRANK *ASci. Ariella COLOMBIN*

Studadsesioj kaj kursoj de AIS

En Paderborn-SchloßNeuhaus (InBIT-domo, salono 216) AIS realigos po unu 16-horan kurson de OProf.Frank 1989-01-03/04 pri „Bazaj laŭkvantaj metodoj de la klerig- kaj lingvokibernetiko" kaj 1989 -o1-05/06 pri „Problemoj legitimigi kaj optimumigi en kurs- kaj instruadplanado". Instrulingvo: ILo. Kotizo: po 1,5 AKU.

Duan AIS-studadsesion en Krynica (PL) organizas PDoc.Dr.habil.Tyblewski 1989-05-15/28. La programo estos havebla ekde februaro.

SUS 6 okazos 1989-08-26/09-04. Probable sekvos studadsesio en Pekino 1989-09-20/26.

8-leciona video-kurso „Elementoj de la Prospektiva Klerigscienco" de OProf.Frank nun estas aĉetebla aŭ luprenebla de la AIS-medioteko.

Außerhalb der redaktionellen Verantwortung

Protokolo de la 7a Ĝenerala Asembleo (la kvara post la oficialigo de AIS)

okazinta dimanĉon, 1988-09-04/1688 pfR, 17h-19h en la *Convento S. Maria dei Padri Servi di Maria* en Valdragone (RSM)

1. Formalaĵoj

La prezidanto malfermas la asembleon kaj disdonas al la ĉeestantaj efektivaj membroj la voĉdonkartojn. Montriĝas, ke ĉiuj efektivaj membroj aŭ ĉeestas aŭ delegis sian voĉon al ĉeestanta efektiva membro. La ĜA do estas kvoruma.

La kvorumeco konserviĝas ankaŭ post la foriro de PDoc.Dr.habil. *T. Tyblewski* je 17h45 (dum punkto 4) kaj de PDoc.Dr.habil. *v. Niewiadomsky-Kauffmann* (kun 2 delegitaj voĉoj) je 18h30 (dum punkto 5).

Laŭ propono de OProf. *O. Pancer*, ADoc. *R. Fößmeier* estas unuanime akceptita kiel protokolanto.

Ne estas ŝanĝproponoj al la tagordo el la invito. Ankaŭ ne estas voĉoj kontraŭ ĉeesto de du gastoj.

2. Ĝenerala raporto de la Senato

La prezidanto raportas, ke la Senato post la lasta ĜA kunvenis en marto/aprilo 1988. Raporto pri la kunveno estis publikigita en la revuo GrKG. Dum tiu kunsido la Senato traktis kunlabor-proponojn de diversaj organizoj: ANSE, GEA, GEI, Gesellschaft für Internationale Sprache e.V. Hamburg, IfK Berlin e.V., IfK Berlin & Paderborn, ILEI, TAKIS, InBIT. Intertempe estas ricevitaj pliaj proponoj de Kataluna Esperanto-Asocio, TEJO, Orientĉina Klerigscienca Universitato de Ŝanhajo, CBI Wiesbaden.

Ministrino *F. Morganti* faris viziton al oficialaj instancoj en Bonn kaj Düsseldorf (D). Pro la tiutempe baldaŭaj elektoj en San Marino la vizito estis privata, interparoloj do okazis kun altaj sed ne plej altaj oficialuloj. Kiel rezulto de tiuj kontaktoj, agnoskopetoj de FRGermanoj pri sanmarinaj titoloj estas nun traktataj kiel de aliaj eksterlandaj universitatoj. La prezidanto esprimas sian esperon, ke similaj rezultoj estos atingitaj en aliaj landoj.

La germanlingva provinco de Belgio, kiu nun estas memstara en la belga federacio kaj do havas la rajton je propraj universitataj institucioj, proponis al AIS organizi SUS-aranĝojn en Eupen. OProf. *Frank* kaj eble ankaŭ OProf. *Vallée* en oktobro partoprenos konferencon kun la prezidanto de la germanlingva provinco en la parlamentejo de Eupen, dum kiu okazos pliaj decidoj.

Pro ekvilibro estas tre dezirinde kunlabori ankaŭ kun lando(j) de la KEIH (Konsilio pri Ekonomia Interhelpo), ekz-e Pollando. AIS do intensigos la kontaktojn pere de PDoc. *T. Tyblewski*.

Academia Sinica per telegramo proponis al AIS la kunan starigon de ILa klerig-instituto en Pekino.

La Ŝanhaja Klerigscienca Universitato agnoskis AIS; la Sudĉina Klerigscienca Universitato probable baldaŭ sekvos.

La Senato kompletigis la regularojn de AIS.

3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto

Trezoristo OProf. *Popović* pro malsano ne povas partopreni en SUS 5. La revizoroj aprobis la bilancon de la fino de marto kaj tiusence raportis al la sanmarina Oficejo pri Instruado kaj Kulturo.

Post tiurilata demando de AProf. *Quednau* la prezidanto informas, ke AIS ne havas ŝuldojn, sed bonhavon de ĉ. 1100 AKUoj.

La subtena sektoro decidis, ke en la komenciĝanta jaro la AKUo valoru 100 germanajn markojn aŭ 75 000 italajn lirojn.

Por la nuna jaro ne ekzistas buĝet-propono. La ĜA ne decidas pri buĝeto; la prezidanto promesas, ne tro devii de la lastjara buĝeto. Germanlingva kasraporto de s-ino *Klemm* estas voĉlegata kaj unuanime akceptita.

4. Decidendaĵoj

La kotizregularo kaj la honorregularo, traktitaj de la Senato je 1988-03-29/31 kaj publikigitaj en GrKG, estas en apartaj voĉdonadoj unuanime akceptitaj.

La prezidanto raportas, ke la ekzamenregularo estis akceptita de la Senato nur kun kelkaj ŝanĝoj al la presita versio. Ne estas pliaj ŝanĝproponoj el la asembleo, do oni (aparte) voĉdonas pri jenaj ŝanĝoj (laŭ la protokolo de la senatkunsido de 1988-03-29/31):

- Oni enprenu en la unuecigitan ekzamenregularon la ankoraŭ validajn erojn de la docentiĝregularo, tiel ke ĝi enhavu ne nur la kondiĉojn por la akiro de la habilitdoktoreco kiel sciencista grado, sed ankaŭ la kondiĉojn por la akiro de la (normale al ĝi ligita) instrurajto („*venia legendi*"), t.e. la akiro de la rangtitolo „plenrajta docento" konforme al la alvokoregularo.
- Oni aldonu al artikoloj 8.2 kaj 8.3 la jenan alineon, kiu ekvalidu tuj: „*La ekzamen-oficejo rajtas decidi eventuale rezigni pri ekzameno en kromfako, se la koncernaj kapabloj kaj meritoj de la kandidato jam alikiale estas evidentaj.*"
- Cele harmoniigon kun la kotizregularo en la lasta alineo de artikolo 12.4 estu tuj postulataj 8 anstataŭ 5 internaciaj respondkuponoj.
- Pro la akceptita formo de la kotizregularo estu tuj pliprecizigite en artikolo 12.2 same kiel en art. 21.3: „... laŭ la apendica kotizlisto de la kotizregularo.".

Ĉi tiuj kvar proponoj estas unuanime akceptitaj.

- Pri artikolo 16.1 la Senato ne interkonsentis; la ĜA voĉdonas pri jenaj alternativoj:

  (a) „Parola ekzamenparto okazas publike, se ne la kandidato mem deziras nepublikecon."

  (b) „Parola ekzamenparto okazas nepublike, se ne la kandidato mem deziras publikecon."

  (c) „Parola ekzamenparto okazas publike aŭ nepublike laŭ la antaŭa decido de la kandidato."

  En la unua baloto la proponoj ricevas resp-e 22/21/14 voĉojn. Ĉar do neniu propono havas absolutan plimulton, OProf. *Frank* retiras sian proponon (a). Dum dua voĉdonado propono (c) estas akceptita per 36 voĉoj (propono (b): 21).
- Aldono: „*Nur por la du ŝtupoj de doktoriĝo, studunuoj el profesia sperto estas agnoskeblaj.*"

  Unuanime akceptita.

Kun tiuj ŝanĝoj, la ekzamenregularo estas unuanime akceptita.

5. Kromaj tagordaj punktoj:

Proponoj:

a) La Senato havu la rajton, proprainiciate alvoki sciencistojn fake kaj lingve elstarajn sen postuli formalaĵojn. Ĉiuj AISanoj estu instigataj al tiurilataj proponoj.

b) AIS publikigu rekomendojn pri sciencaj aŭ prisciencaj temoj; la unua tia temo estu „nova komunikada moralo", pri kiu oni diskutu dum la venonta jaro.

c) AIS eldonu informbroŝuron pri si, kies kostojn proponis pagi ADoc. Dr.h.c. *G. Klemm*.

La punktoj a), b) kaj c) estas unuanime akceptitaj.

d) La Senato interkonsentis kun aliaj organizaĵoj, esti kunproponanto en la projekto DELTA. La ĜA aprobas la decidon sen aparta voĉdonado.

6. Elektoj

La Senato proponas, altigi la nombron de la senatanoj de 6 al 7. OProf. Frank proponas la elekton de du novaj Senatanoj, kiuj tamen akceptu la elekton nur, kiam evidentiĝos, ke ili povos ĉeesti la sekvan senatkunsidon. Li proponas la profesorojn *Schick* kaj *Kawamura*. Propono pri nesekreta voĉdonado estas akceptita; OProf. *Schick* estas elektita unuanime kaj OProf. *Kawamura* kun unu sindeteno.

7. Diversaĵoj

La prezidanto voĉlegas el la protokolo de la senatkunsido la asociojn, kiuj proponis al AIS reciprokan agnoskon. La proponoj estas unuanime akceptitaj.

AProf. *Quednau* nome de la 5a sekcio proponas kunlaboron de AIS kun s-ro *Novobilsky* pri terminologio kaj la aranĝo de terminologiaj kursoj en Ĉeĥoslovakujo. La prezidanto voĉlegas el la protokolo de la koncerna sekcikunsido. La propono estas unuanime akceptita.

ADoc.Dr.R.Fößmeier	OProf.Dr.H.Frank
Protokolanto	Prezidanto

Kommunikation - mit Rechnern, ohne Rechner, durch Rechner

Raporto pri germanlingva konferenco de AIS la 14an kaj 15an de oktobro 1988 en Eupen (B)

Mitte Oktober fand in Eupen, der Hauptstadt der Deutschsprachigen Gemeinschaft in Belgien, eine Wochenendtagung der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino statt. Ihr Thema war die Mensch-Maschine-Kommunikation. Für diese Tagung, an der zeitweise auch der Parlamentspräsident, Herr K.Ortmann, und der zuständige Minister, Herr B.Fagnoul, teilnahmen, wurde der AIS der Plenarsaal des Rats der Deutschsprachigen Gemeinschaft zur Verfügung gestellt. Der äußere Rahmen, der herzliche Empfang, die vorzügliche Betreuung und die gute Organisation hatten einen wesentlichen Anteil an dem insgesamt sehr erfreulichen Verlauf der Veranstaltung. In den Referaten, die im Januar 1989 in einem Sammelband (als Beiband des 30. Jahrgangs der grkg/Humankybernetik) mit je einer Zusammenfassung in ILo und Französisch erscheinen sollen, wurden die folgenden Themen behandelt:

1. Begrüßung und Eröffnung durch den Präsidenten des Rats der Deutschsprachigen Gemeinschaft, K.Ortmann

2. Zur Situation der Deutschsprachigen Gemeinschaft. Ansprache des Gemeinschaftsministers für Ausbildung, kulturelle Animation und Medien, B.Fagnoul

3. Die Internationale Akademie der Wissenschaften (AIS). Vorstellung durch Prof.Dr.Frank

4. DV-Markt und Bildungspolitik. ASci.Bac. sc.hum. K.Bolle, Direktor des CBI Wiesbaden

5. Überlegungen zur sprachlichen Kommunikation und politischen Integration Europas. AProf.Dr.G.Pröbstl

6. Grundlegende Konzepte von Programmiersprachen. Prof.Dr.K.Schick

7. Natürlichsprachige Kommunikation mit einem Expertensystem. B.Pavlu (ISK), InBIT Paderborn

8. Normierungsstrategien in Klein- und Minderheitssprachen. ASci.Mag.J.Dingeldein

9. Interlinguistische Plansprachprojekte und der Erfolg der Internacia Lingvo (ILo) des „Doktor Esperanto". H.Behrmann (ISK), Direktor des Bildungswerks „Kultur und Sprache" / Esperanto-Centro Paderborn

10. DLT - ein mehrsprachiges Übersetzungssystem mit internationalsprachigem Kern. ADoc. Dr.D.Maxwell, BSO Utrecht

11. Perspektiven einer neuen Kommunikationsmoral für das Zeitalter der Kybernetik. Prof.Dr.H.Frank

12. „AIS-Präsenz in Belgien? Wozu? Wie? Wann? Wo?" - abschließende Podiumsdiskussion unter Leitung von Ratspräsident Ortmann

Alle Vorträge und die Diskussion fanden in deutscher Sprache statt. Eine vollständige Videoaufzeichnung befindet sich in der Videothek der AIS; Kopien sind für DM 120,- erhältlich. Die Druckfassung als Beiband 1989 der grkg/Humankybernetik erhalten Subskribenten (Bestellschluß: 21. Januar 1989) und Abonnenten der gkrg/Humankybernetik für 9,80 DM; späterer Ladenverkaufspreis 14,70 DM.

Informbroŝuro pri AIS

Helpe de larĝanima donaco de estrarano la Subtena Sektoro aperigis en la oktobro 1988 lukse aspektan, informriĉan broŝuron pri la strukturo, celoj, efektivaj membroj, studadplanoj, akireblaj sciencistaj gradoj, kaj ĝisnunaj SUS-kursoj de AIS. La grandformata, 20paĝa, per kolorbildoj impone ilustrita informilo en la lingvoj internacia, germana kaj itala (paralela eldono en ILo, Angla kaj Franca estas preparata) estas havebla je DM 6,- plus DM 1,- sendkostoj.

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo.
Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/ Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete: plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.